

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

27-a Jarkolekto * Septembro 2011 * N-ro 93

ISSN 1576 - 0618



VERA

**horto kaj plaĝo sub la suno
en la orienta Andaluzio**

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
La Plumbaj Libroj	6
Projekto <i>ANDA-LERNU</i>	10
Lingva Angulo	13
Kiel kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio	17
Internaciaj Esperanto-Asocioj –LIBE-	18
Poezio.....	21
Turismi en <i>Vera (Almerio)</i>	23
Paĝoj pri Nia Historio.....	28
Flamenko	30
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	32
Kiel aliĝi al A.EU.....	34
Andaluza Kuirarto	35
Ludu kun ni.....	36
Humuro	38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



VÉLEZ-MÁLAGA

La pasintan 11-an de decembro kelkaj membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo renkontiĝis en Vélez-Málaga por celebri la Zamenhof-Tagon. Ĉeestis ĉefe malagaj gesamideanoj, de Vélez Málaga mem, de la urbo Málaga kaj de Arundo. La Andaluza Zamenhof-Tago komenciĝis ĉe kafejo, kie estis eble gustumi ĉokoladon kaj post longa kaj kultura promenado tra la moderna kaj historia kvartaloj de la urbo, kie nia amiko Fabián estis lerta ĉiĉerono, alvenis la tempo por manĝi en alloga hinda restoracio. Poste ĉe Fabián la gepartoprenantoj ĝuis esperantan ludon per specialaj ludkartoj celantaj praktiki la lingvon. Nu, ni dankas al Fabián kaj la ceteraj vélezaj samideanoj pro ilia agrabla akceptemo kaj sindonemo dum tiu tago.



KORDOVO

Post la okazigo en Sevilo de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, nia asocio decidis ekigi projekton celanta instrui la internacian lingvon tra la tuta Andaluzio. Temas pri la projekto “Anda-Lernu”, pere de kiu oni organizos rapidajn kaj intensajn kursojn de esperanto dum semajnfino en diversaj andaluzaj urboj kaj vilaĝoj. La intruisto estos nia onuba samideano Rafaelo Mateos, kiu volonte sin proponis por vojaĝi kaj resti dum semajnfino en kiu ajn urbo de Andaluzio, se oni atingas en tiu urbo loko por instrui.



La unua urbo kie okazis ĉi tia kurso estis Kordovo. Do, dum la semajnfino de la 3-a kaj 4-a de decembro, oni organizis ĉe la Junulara Restadejo de Kordovo, intensan kurson de esperanto. Oni invitis ĉeesti al ĉiuj aliĝintoj al la per-reta kurso de *lernu.net* kaj 7 el tiuj gelernantoj partoprenis. Nia samideano Rafaelo instruis la lingvon, el la plej bazaj konoj, tute praktike, preskaŭ sen hispanlingvaj klarigoj. Ĉeestis la 3 sesioj de la kurso, tio estas mateno kaj vespero de la sabato kaj denove mateno de la dimanĉo, 5 gelernantoj, ĉiuj ili junaj. Do, oni povas aserti, ke ĉi tiu unua pruvo organizi intensan kaj rapidan kurson dum semajnfino sukcesis. Multajn Dankojn al Rafaelo, kaj espereble nova kurso okazos kie ajn tra la andaluzia geografio.

MALAGO

La 25-a de novembro komenciĝis en Malago nova elementa kurso de esperanto. Ĝi okazas ĉe la kulturejo *La Casa Invisible*, str. Nosquera 11. La instruistino estas la membro de nia asocio Carmen San Segundo Cordero. La kurso okazas vendrede de la 20:00 ĝis la 22:00 horo. Organizas la kurson la ekologia asocio *Ecologistas en Acción*.




Lastmomenta informo:

La granadaj esperantistoj renkontiĝas ĉe kafejo de tempo al tempo, cele la organizadon de la movado en Granado. Se Vi loĝas en Granado kaj deziras kunlabori, bv. kontakti kun: esperantoengranada@gmail.com
Ni pli-informos venonnumere.

LA PLUMBAJ LIBROJ

En la jaro 1588, kiam masonistoj detruis la turon de la plej grava moskeo en Granado, por starigi tie novan navon de la kristana katedralo, aperis inter la ruĵoj, malgranda plumba skatolo enhavanta kelkajn tol-pecojn, stabuleton kie aperis bildo de la



de la Virgulino Maria en egiptaj vestaĵoj, oston kaj pergamenon kun arabaj, kastiliaj, latinaj kaj grekaj karakteroj. La pergameno menciis profetaĵon de Sankta Johano pri la fino de la tempoj, oni informis ankaŭ pri la alveno de la profeto Muhammad kaj pri la avanco de Lutero, reprezentata de drako dividanta la kristanajn regnojn kaj ĉi ĉio subskribita de la kristana episkopo Cecilio. Laŭ la granada legendo, Sankta Cecilio estis la unua episkopo de la tiama *Iliberris*, la romia Granado.

Post tiu eltrovo, la konsilantaro de la Granada Eklezio renkontiĝis por pristudi la aŭtentikecon de tiuj dokumentoj, malgraŭ la fakto, ke la popolo jam pensis ke temis pri miraklo, nur la Eklezia Konsilantaro povis deklari ke tiuj eltrovaĵoj estis aŭtentikaj. Kelkaj fakuloj dubis pri la tekstoj, tamen neniu kuraĝis kontraŭi la komunan opinion kaj tiel, ĉiuj ili kvalifikis la eltrovon kiel miraklon.

En la jaro 1595 ĉe montaro apud Granado konata kiel *Valparaiso*, oni trovis, ene de kaŝita groto, novan trezoron. Temis pri plumbaj lamenoj skribitaj per stranga alfabeto, post esploroj oni vidis,

ke temis pri deformita araba lingvo. La tekstoj parolis pri diversaj kristanaj sanktuloj kaj apude troviĝis ostoj kaj cindroj. La plumbaj lamenoj, kunigitaj de metala fadeno, estas konataj kiel *plumbaj libroj*, kvankam verdire neniel ili aspektas libroj. La entuziasmo de la granada popolo pligrandiĝis kaj baldaŭ sur la monto *Valparaiso* oni starigis centoj da krucoj, ekde tiam tiu loko nomiĝas “Sankta Monto”, en la hispana lingvo *Sacromonte*.

Kvankam la granada kristana eklezio deklaris denove ke tiuj libroj kaj relikvoj estis aŭtentikaj, oni decidis sendi ilin al Romo, kie la Papa Kortumo devus prononci sin. En Romo oni distingis relikvojn kaj tekstojn. Tiel, en la jaro 1600 la katolika eklezio deklaris, ke la relikvoj eltrovitaj en Granado estis aŭtentikaj kaj laŭdindaj. Tamen, kio pri la libroj?

Kiel dirite, ekde la unua momento la Katolika Eklezio distingis relikvojn kaj libroj, sendube pro la fakto, ke pri la libroj ĉiam ekzistis duboj pri ĝia aŭtentikeco, sed pri la relikvoj la popola religio akceptis ilin kiel laŭdindaj. Tiel, en la jaro 1600 finiĝis la unua parto de la proceso, komenciĝis tiam la dua parto, rilata al al pristudo nur de la plumbaj libroj mem. Dum tiuj jaroj okazis la tiel nomataj *granadaj diskutoj*, dum kiuj kredemuloj kaj ne-kredemuloj opiniis pri la aŭtentikeco de la libroj. En la jaro 1682 la Papa Kortumo deklaris ilin falsaj, malgraŭ tio la Granada Urbodomo ĉiam estis favoraj al la aŭtentikeco de tiuj libroj.

Dum la 19-a jarcento oni ekigis seriozan studon pri la origino de la relikvoj kaj libroj. Oni akceptis, ke la aŭtoroj de la libroj estis Alonso del Castillo kaj Miguel de Luna, ambaŭ moriskoj, ili estis reĝaj kuracistoj kaj tradukistoj de la araba lingvo, sed kiuj ili estis reale?

Alonso del Castillo naskiĝis en Granada proksimume en la jaro 1520. Li sekvis medicinajn studojn en la Granada Universitato kaj li poste laboris kiel kuracisto sukcese. Li samtempe agadis kiel tradukisto ĉe la reĝa kortumo, al li ŝuldiĝas la unuajn tradukojn de la enskriboj

gravuritaj sur la muroj de l'Alhambro. En la jaro 1573 la reĝo Filipo la 2-a alvenigis lin en Madridon por traduki arabalingvajn manuskriptojn en la Monaĥejo *El Escorial* kaj ankaŭ por traduki la leterojn senditaj al la Maroka Sultano. En la jaro 1587 li revenis en Granadon kie li tradukis la arablingvajn restaĵojn trovitaj en la Katedralo kaj en Sakromonto.



Salomona stelo, arabaj enskriboj kaj Bildo de la Virgulinino Maria.
Jen la sinkretismo de la plumbaj libroj de Granado.

Rilate al Miguel de Luna, li naskiĝis en Granado en la jaro 1550. Ankaŭ li sekvis medicinajn studojn en la Universitato de Granado. Pri li oni ne konas multe, nur ke ankaŭ li tradukis la manuskriptojn trovitaj en Granado dum la konstruo de la kristana katedralo. Do, Miguel de Luna kaj Alonso del Castillo kunlaboris en la tradukado de tiuj arab-lingvaj tekstoj. Do, kial ili estas la aŭtoroj de la plumbaj libroj kaj kion ili celis pere de tiu trompo?

Kiel dirite, la aŭtoroj de la plumbaj libroj estis moriskoj, do, ili apartenis al socia grupo apartigita de la nova kristana socio kaj tio, malgraŭ la altstuda nivelo de ambaŭ homoj. Ili volis per la “mirakla eltrovo” de tiuj relikvoj kaj libroj pruvi, ke la apero de la Mahomeda religio estis io jam atendita de la unuaj kristanoj. Tiel la celo de la

plumbaj libroj estis profeti, ke nova religio aperus, kaj ĝi estus tre simila al la kristanismo mem, pro la fakto, ke temis pri la sama Dio, do kristanoj kaj islamoj estus reale filoj de la sama Dio, tio estas: ili estus fratoj en la fido. Ĉi ĉio, se asertita de mirakla antikva episkopo, sendube povus esti pli bone akceptita de la kristana granada socio, tion pensis la veraj aŭtoroj de la plumbaj libroj.

Do, pere de la “aperigo” de la plumbaj libroj oni proponis sinkretisman solvon inter la kristanismo kaj la islamismo, kio sendube alportus la respekton al la araba lingvo kaj kulturo, kaj tio evitus kion tiutempe jam estis minaco, la forpelo de la moriskoj, kio finfine okazus pere de Reĝa Dekreto en la jaro 1609.



Plumbaj Libroj en Granado

Laŭdire, al la apero de la plumbaj libroj kunlaboris eĉ la kristana granada eklezio, tiel la episkopo Pedro de Castro favoris la falsadon de la tekstoj, cele la revivigon de la popola fido en Granado. Verŝajne li deziris aperi kiel la profeto de la nova religia revelacio.

Tamen, kvankam ne tute konataj la celoj de la falsantoj, verdire la “mirakla eltrovo” de la libroj ne atingis la deziratan celon. Tiel, la Kristana Eklezio ne akceptis islamajn influojn kaj fine oni forpelis la moriskojn el la tutaj hispanaj regnoj, ankaŭ el Granado. Tio provokis veran drenadon de la ter-kulturado, metioj kaj kulturo de la hispanaj regnoj, plejeble eviti ĉi ĉion estis la vera kaŭzo de la “aperigo de la plumbaj libroj”.


Fine, nur diri, ke la plumbaj libroj estis definitive rehavigitaj al la Granada Urbodomo el la Vatikano en la jaro 2000.

Projekto *ANDA-LERNU*

Unu el la ĉefaj decidoj de la lasta Andaluzia Kongreso de Esperanto estis la ekigo de la projekto *Anda-Lernu*, pri kio ĝi temas?

Nu, pere de ĉi tiu agad-plano oni proponas la organizadon de rapidaj kaj intensaj kursoj de la internacia lingvo. Kvankam ne estas necese posedi elementajn konojn de esperanto, ja la kurson oni pripensis por la homoj kiuj aliĝis al la interreta kurso *lernu.net*, kvankam kiel dirite, ne temas pri nepra kondiĉo por partopreni en ĉi tiu projekto.

La kursoj okazos dum semajnfino, tiel oni profitas la horojn kiel eble plej efike. La kursoj komenciĝas sabate matene, ĝis tagmeze, kaj poste okazas denove dum la sabata vespero. Dimanĉe la sola sesio estas tiu matena. Entute la kurso daŭras, proksimume, 12 horojn.



Jen la celo de la Projekto *ANDA-LERNU*, saltadi tra la tuta andaluzia geografio kaj instruadi esperanton

Por la okazigo de ĉi tiuj kursoj oferis sin Rafaelo Mateos, samideano de la urbo Onubo, kiu jam instruis esperanton tra la tuta mondo, t.e. Ukrainio, Ĉinio, Japanio, Francio, Maroko... Kvankam oni antaŭkalkulis neniun nombron da eblaj gelernantoj, oni pripensis, ke 5/10 el ili estus la plej taŭga nombro. Tiel, unu monato post la lanĉo de la projekto okazis la unua kurso en Kordovo.

Andaluza Esperanto-Unuiĝo sciigis pri la projekto al ĉiuj aliĝintoj de *lernu.net* en Kordovo. La 25% el ili respondis favore al la propono ĉeesti ĝin. Fine kvin homoj ĉeestis la kurson, unu el ili eĉ venis el Lucena, kordova vilaĝo je 80 kmoj el la urbo. La rezulto estis tre kontentiga. La instru-metodo de Rafaelo estis ege efektiva, preskaŭ nenia gramatika instruado aperis, kontraŭe, la paroligado estis konstanta: *mi, ni, li... mi ne scias, demandu al ŝi...* estis frazoj aperantaj ekde la unuaj minutoj de la kurso kaj post unu/du horoj la gelernantoj kapablis paroli kaj kompreni elementan konversacion.

Post unu tago kaj duono, tiuj homoj aliĝintaj al *lernu.net*, kiuj komprenis esperanton nur el la interreta vidpunkto, tio estas esence skriba, estis kapablaj paroli kaj subteni konversacion en esperanto kaj tio kio ja estas pli grava, la gelernantoj komprenis, ke la lingvo funkcias, do, ili deziris daŭrigi la lernandon.



La Municipala Televido *TELEMOTRIL* intervjuis al Rafael Mateos okaze de la kurso de esperanto en Motril (Granado)

Post la okazgto de ĉi tiu unua kurso en Kordovo, AEU decidis daŭrigi la projekton. Paco Sánchez, samideano de Motril (Granado), proponis sian urbon por nova kurso, li eĉ atingis la pruntedonon de kultura sidejo dum kompleta semajnfino. Oni propagandis la kurson al ĉiuj aliĝintoj de *lernu.net* en la provinco Granado, kvankam oni devas diri, ke la urbo Motril troviĝas je 50 kilometroj el Granado, do ne estis facile iri kaj reveni el Granado en Motrilon dufoje dum semajnfino. Ĉeestis al la Motrila Kurso 8 homoj alvenintaj de Motrilo mem, Granado kaj Malago.



Rafaelo MATEOS instruas la lingvon en Motril okaze de la dua sesio de la projekto *Anda-Lernu*.
Februaro 2012

Eblaj venontaj urboj kie okazos la kursoj:

- Granado.
- Linares.
- Jaeno

Se Vi deziras proponi Vian urbon, bv. kontakti kun:
esperantoandaluzia@gmail.com

Lingva Angulo

La uzo de la refleksiva voĉo

La uzo de la refleksiva voĉo en esperanto ofte kaŭzas problemojn al kastili-lingvanoj, pro la fakto, ke oni devas distingi inter “refleksiva voĉo” kaj “mediala voĉo”, kaj ni povas ne-uzi ĝuste ambaŭ formojn en esperanto, se ni rekte tradukas hispanan frazon. Do, ni pritraktu la temon pri kiam uzi verbon finanta per –iĝ- kaj kiam la refleksivan pronomon –min, vin, sin, nin...”.

Tiel, en la kastilia lingvo ni diras:

Él se peina cada mañana

kaj ankaŭ

Mi padre se jubiló el año pasado

Kompreneble, ne necese temas pri la tria persono, ankaŭ ambaŭ frazoj ekzistas en la unua persona pronomo:

Yo me peino cada mañana.

Yo me jubilaré dentro de unos pocos años.

En esperanto, ne temas pri similaj frazoj, en unu el ili ni uzos la refleksivan formon: “verbo + pronomo en akuzativa formo”; kaj en la alia frazo, ni uzos “medialan voĉon kun la verbo finiĝanta per *iĝ*”. Kiam ni uzu unu aŭ la alian? Ni vidu:

La uzo de la mediala voĉo (iĝ) kaj la aktiva voĉo en la refleksiva formo (verbo + pronomo) estas iom parencaj. La diferenco inter la du formoj estas, ke la refleksiva voĉo esprimas agon faratan vole, konscie, kaj ĉiam temas pri frazoj kie la aganto (subjekto) kaj tiu kiu ricevas la agadon (rekta objekto) estas la sama persono. Tiam, ni uzos jenan strukturon:

Subjekto + Verbo + Akuzativa pronomo rekte ligita al la persono de la subjekto.

Ekzemple:

Mi kombas min ĉiumatene (Yo me peino cada mañana)

La kato lavas sin lerte (El gato se lava con habilidad)

Atentu! La refleksiva formo de la tria persono ĉiam estas –SIA–
ne lia, ŝia, ĝia aŭ ilia.

Pliaj tipe refleksivaj verboj:

Mia onklo ne razas sin de antaŭ du monatoj.

Mi tío ne se afeitita desde hace dos meses.

La infanoj banis sin ĉe la rivero.

Los niños se bañaron en el río.

La princino vestis sin per riĉaj vestaĵoj

La princesa se vistió con ricos vestidos.

Kompreneble, ĉi ĉiuj verboj povas agadi ne kiel refleksivaj, tiel la aganto (subjekto) ne estus la sama persono ol tiu kiu ricevas la agadon de la verbo (rekta objekto).

Ekzemple:

Mi razas ĉiumatene mian patron.

Yo afeitito cada mañana a mi padre.

Nur temus pri refleksiva verbo se subjekto kaj la rekta objekto estas la sama:

Mi razas min ĉiumatene.

Yo me afeitito cada mañana.

Kiam uzi la verbon en iĝ-formo?

Nu, se oni tradukas rekte en la hispanan la jenan frazon:

Mi ellitiĝas ĉiutage je la 7-a horo (yo me levanto cada mañana a las 7) *kaj poste mi vestas min kiel eble plej rapide* (y después me visto lo más rápidamente posible). Ni vidas, ke ambaŭ verboj “ellitiĝi” kaj “vesti min” ŝajnas esti refleksivaj, sed en esperanto tio ne okazas, ĉar nur estas refleksiva la verbo de la dua frazo: *mi vestas min kiel eble plej rapide*.

La finaĵo IĜ de la verboj signifas ŝanĝon de stato, ne precizigante, ĉu la kaŭzo de tiu ŝanĝo estas ekstera (ne-vola ŝanĝo) aŭ interna (dezirita ŝanĝo). Tiel, se “mi ellitiĝas ĉiutage je la 7-a horo”, tio signifas, ke mi antaŭ la sepa horo estis ene de la lito kaj post la sepa mi eliras el la lito, do, mi ŝanĝis mian staton. Tiel, kvankam en la hispana lingvo *levantarse* kaj *afeitarse* posedas similan strukturon, en esperanto tio ne okazas, ĉar la verbo “razi sin” signifas, ke mi razis kaj samtempe, ke mi ricevis tiun razadon; tamen la verbo “ellitiĝi” sciigas, ke mi ŝanĝis mian staton, tiam mi estis en la lito, poste mi eliris el la lito.

Ni vidu jenajn frazojn kun verbo en iĝ-formo:

La fenestro frakasiĝis de balon-ĵeto.

La ventana se hizo añicos por un balonazo.

La prezidanto stariĝis kaj li ekparolis.

El presidente se puso de pie y empezó a hablar.

La situacio en Afriko akriĝis dum tiuj jaroj.

La situación en África se volvió más dura durante esos años.

Alia klara ekzemplo estas “edzo-edziĝi / edzino-edziniĝi”. *Edzo* aŭ *edzino* estas la *viro* aŭ la *virino* laŭleĝe ligita kun *viro* aŭ *virino* por kunvivado. En la frazo *Karlo edziĝis al Maria*, la verbo “edziĝis” klare esprimas la fakton, ke la subjekto (Karlo) ŝanĝis sian staton,

antaŭe li estis fraŭlo kaj poste edzo, do *li edziĝis*. Se ni diras, ke *Maria edziniĝis al Karlo*, tio signifas, ke Maria antaŭe estis fraŭlino kaj poste edzino, do *ŝi edziniĝis*. Li kaj ŝi ŝanĝis sian staton, sed tute ne temas pri refleksiva verbo, kvankam en la hispana lingvo oni tradukas jene:

Carlos se casó con María.

Karlo edziĝis al Maria.

María se casó con Carlos.

Maria edziniĝis al Karlo.

Ĉu estas eble uzi unu aŭ alian formon sed kun egala signifo? Nu, verŝajne temas pri tute kompreneblaj eraroj ĉar ili estas tre oftaj. Tiel, estas normale legi aŭ aŭskulti:

La tero turniĝas ĉirkaŭ la suno.

La tero turnas sin ĉirkaŭ la suno.

La tierra gira alrededor del sol.

Li okupiĝis pri tiu afero.

Li okupis sin pri tiu afero.

El se ocupó de esa cuestión.

Tamen, pli bone se ni memoras jenan regulon:

Se temas esence pri refleksiva formo, tio estas, la subjekto kaj tiu kiu ricevas la agadon de la verbo estas la sama persono, ni uzos “verbon + akuzativan pronomon”. Se temas pri ŝanĝ-stato, ni uzos verbon finiĝanta per “iĝ”.



Se Vi havas ian gramatikan dubon, bv. skribi nin, ni pruvos klarigi ĝin..... se ni povas kompreneble.

Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
andaluciaesperanto@gmail.com
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio “Marbordo de la Suno”
<http://www.ipernity.com/home/123729>
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto
info@esperantosevilla.org
- ✓ Asociación Cordobesa de Esperanto
esperanto14@ono.com
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio
ridinda@gmail.com
- ✓ Club de Esperanto de Ronda
esperantoarunda@gmail.com
- ✓ Asociación Onubense de Esperanto
rafmagon@yahoo.com
- ✓ Esperanto el Kadizo
esperantokadizo@gmail.com
- ✓ Bulteno “Monate ĉe Vi”
angelarquillos@gmail.com
- ✓ Revuo “Gazeto Andaluzia”
esperanto14@ono.com

The logo consists of the lowercase letters 'aeu' in a stylized, rounded font. The letter 'e' is white and set within a dark square, while 'a' and 'u' are dark.


Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Internaciaj Esperanto-Asocioj

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj –LIBE–

La unua esperantisto kiu okupiĝis pri la disvastigo de la internacia lingvo inter la blinduloj estis la franca profesoro Teophile Cart. Li organizis kurson ĉe blindulejo en Laussane (Svisio) en la jaro 1904 kaj tiel, kun la helpo de blindaj lernantinoj fiksas la kvin supersignitajn konsonantojn laŭ la brajla sistemo laŭ jene:



Tuj, oni presis brajlan gramatikan de esperanto en diversaj lingvoj kaj ankaŭ aperis la unua revuo en brajla alfabeto sub la nomo *Esperanta Ligilo*. Ĝi aperis dekfoje en la jaro. En la Universala Kongreso de la jaro 1909 partoprenis 25 blinduloj kaj en 1913 centoj da blindaj geesperantistoj aperis sur la Ĝenerala Adresaro de Esperantistoj.

Post la unua mondmilito la Nacia Blindul-Instituto de Londono favore apogis la eldonadon de ĉiumonata revuo por blinduloj. La unua

kongreso de blindaj esperantistoj okazis en la jaro 1921 en Praho kaj du la sekvantaj jaroj, ĝi okazis koincide al la Universalaj Kongresoj. En la jaro 1924 en Vieno, oni fondis la Universalan Asocion de Blindaj Esperantistoj *UABE*, kaj poste esperanto-asociojn specife por blinduloj en Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hungario, Germanio, Francio kaj Danlando. En la jaro 1931 Ĝenerala Adresaro enestis pli ol mil blindaj geesperantistoj.

En tiu sama jaro, la 19-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, okazinta en Munkeno, *UABE* fariĝis *LIBE*, *Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj*. La asocia eldonas la revuon "Esperanto Ligilo", aperanta dekfoje en la jaro per brajla sistemo, kvankam ne estas la sola eldonaĵo por blinduloj en la E-movado.



Gepartoprenantoj en la 77-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Olomouc (Ĉeĥio). Ĉeestis 60 personoj.

Tiel, la ĉeĥa revuo *Auroro* aperas trifoje en la jaro, *Esperanta Fajrero*, eldonita de la Asocio de Nevidantaj Esperantistoj de Bulgario, aperas ankaŭ ĉiu kvaronjaro. La Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj eldonas *Itala Ligilo* kaj en Germanio ekzistas *La Blinda Esperantisto*.

Nuntempe la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj havas preskaŭ 500 aliĝintojn, kaj ĝia celo estas disvastigi esperanton inter

blinduloj kaj informi pri la vivo de diverslandaj blinduloj. La ĉefa agado de la asocio estas, krom la organizado de konferencoj, sonregistri librojn kaj gazetojn kaj eldoni librojn en esperanto en brajlo kaj liveri ilin al blinduloj. Same, en la jaro 1983 LIBE fondis la Fonduson “Vasilij Eroŝenko”, omaĝe al la fama blinda rusa esperanto-verkisto. La fonduso celas havigi senpage brajlajn E-librojn al organizoj kaj individuoj kiuj bezonas ilin, sed pro diversaj kaŭzoj ne povas pagi.

Pliaj informoj pri LIBE troveblas ĉe: <http://libe.narzan.com>

En Hispanio unu el la fondintoj de la nuntempa ONCE (Hispana Asocio de Blinduloj), kaj ĝia direktoro inter la jaroj 1945 kaj 1959, estis S-ro José Ezquerro Berges. Li estis esperantisto ekde la komenco de la jarcento kaj publikigis la unuan gramatikon de la internacia lingvo en Hispanio en la brajla sistemo. Alia fama blinda hispana esperantisto estas S-ro Pedro Zurita, eksa ĝenerala sekretario de la Monda Organizo de Blinduloj, kiu nuntempe aktivas ĉe diversaj E-forumoj kaj ofte prelegas pri la internacia lingvo.

S-ano Pedro Zurita legas prelegon per brajla transkribado okaze de la prezento de la libro “El Hombre que desafió a Babel”, biografio de L.L. Zamenhof.



Poezio

Fratinet' María

Fratinet' María,
morgaŭ estos festo,
do ni du ne iros
studi al lernejo.
La gainon belan
vi al vi surmetos,
la plej bonan jupon
kaj la kapo-reton.
Portos mi la bluan,
bon-kvalitan veston,
la ĉemizon novan
kaj la lan-ŝtumpretojn,
kaj, se suno brilos,
ĉapon el flanelo
(la avin-donacon
en la Pask-celebro)
kaj, de la najbaro,
medal-kolieron,
kiun li aĉetis
en foir-vendejo.
Ni la kirkon iros
kaj aŭskultos meson.
De l'onklin' pot-venda
monon ni ricevos.
Por regalo nia
tiam ni aĉetos
(kaj ĝin prisekretu)
tre bongustajn berojn.
Ludos mi je taŭroj
jam en la vespero.

Vi kun la fratinoj
Juana, Magda, venos
kaj kun Tuerta, Blanka
(la du kuzinetoj)
en la placo lude
la pupinojn flegos.
Kaj se panjo donos
al vi kastanjetojn,
povos vi ĉe l'pordo
danci ĝis elĉerpo.
Andreŭela kantos:
"Panjo, viaj herboj
min ne resanigis:
vanis la rimedo."
El papero ia
tajlos mi livreon,
kun morusa ŝmiro
bele ĝi aspektos.
Mi kapuĉon faros
plenan de kreneloj,
kiel nigran tufon
la du plumojn metos
el la vost' de l'koko,
kiun en ĝardeno
ni ĉasadis ride
antaŭ la Karesmo.
Flagon mi alfiksos
tuj al longa vergo,
kaj du blankajn kvastojn
al la ŝnuraj plektoj.

En la kan-ĉevalon
 ledan kapon premos,
 kaj la brido-paron
 faros el fadenoj.
 Rajde, kapriole,
 mi la staton tretos
 kun kvartalaj buboj
 (pli ol kelkaj dekoj)
 kaj la etan placon
 turnos en arenon.

Tie Barbolilla
 vidos nin ka jspektos.
 Ŝi, panistidino,
 panon kun butero
 al mi ofte donas
 kun kontenta sento,
 ĉar ni ambaŭ kune,
 kaj de temp' al tempo,
 kaŝe post la pordo
 faras fi-aferojn.

Luis de Góngora y Argote
 Kordovo, 1561 ~ 1627

Tradukis: Fernando de Diego



2011-a

450 datreveno de la naskiĝo de Luis de Góngora

Turismi en ... VERA (Almerio)

Ĉe la orienta parto de la almeria provinco sidejis unu el la plej antikvaj civilizacioj en la Ibera Duoninsulo, tiu kiu ricevis la nomon "Kulturo del *Algar*". El la mina riĉeco de tiu zono profitis tiuj antikvaj setlantoj kaj ankaŭ aliaj popoloj, kiel la kartaganoj, fondintoj de la vilaĝo *Baria*, proksimume dum la 6-a jarcento a.K tuj apud la enfluejo de la rivero *Almanzora*. Poste alvenis la romianoj, kiuj ankaŭ profitis la mineralajn resursojn de la zono. Belaj romiaj restaĵoj troviĝas en la loko nomita *Rocipón*, apud la preĝejo *Nuestra Señora de las Huertas*, en la nuntempa Vera.

Kiam la araboj eniris en la Iberan Duoninsulon la novaj enloĝantoj decidis translokigi la urbon kaj forigi ĝin el la ne-sekura marbordo. Oni elektis malgrandan vilaĝeton situita sur monteto. La nova islama urbo *Vera* estus la ĉefurbo de unu el la plej gravaj zonoj de la granada regno, tuj apud la landlimo de la kristana vilaĝo *Lorca*.



Blazono de VERA

Pro tio, de tempo al tempo, okazis luktoj inter kristanoj kaj islamanoj en la zono, foje eĉ grandaj bataloj, kiel tiu de *Los Alporchones* en la jaro 1452. En la jaro 1488 la Katolikaj Gereĝoj konkeris la vilaĝon *Vera* kaj nur post kvar jaroj la islama granada regno malaperis. *Vera* troviĝis ĝuste fronte al la nordafrika marbordo kaj pro tio, la kastiliaj reĝoj timis la eblan helpon de la berberaj enloĝantoj de Alĝerio al iliaj samreligiaj de tiu zono. Pro tio la kastilia reĝo decidis alvenigi en *Veran* kaj ĉirkaŭaĵoj, novajn kristanajn enloĝantojn. Do, la urbo ricevis en

la jaro 1494 specialajn privilegiojn donitaj de la gereĝoj.

La 9-an de novembro 1518 okazis terura tertremo en la zono, kiu detruis komplete la vilaĝon, tiam pli ol 200 domoj, fortreso kaj muregoj. La enloĝantoj decidis denove translokigi la urbon al apuda ebenaĵo. La vilaĝo havus kvadratan planon, gardita de ok turoj kaj kun du grandaj pordegoj, meze troviĝus la preĝejo kiu povus esti uzata ankaŭ kiel fortreso.



Longegaj plaĝoj ĉe la Mediteranea Maro, jen unu el la plej gravaj allogaĵoj de *Vera*

En la jaro 1568 la moriskoj, tiuj islamanidoj kiuj restis en Andaluzio post la kastilia konkero, rebeliĝis kontraŭ la reĝo. La ĉefaj lokoj de tiu ribelo estis la sudo de la nuntempa provinco Granado kaj Almerio. La enloĝantoj de *Vera* estis kristanoj, do, ili ne apogis la moriskan ribelon, pro tio la armeo de Aben Humeja sieĝis la urbon. Tamen, la kristanaj trupoj alvenintaj de la najbara Murcia vilaĝo *Lorca* malebligis la konkeron de *Vera* fare de la ribelantoj, kiuj finfine estis venkataj kaj forpelitaj el la Ibera Duoninsulo en la nordon de Afriko.

Dum la 18-a jarcento la vilaĝo kreskis kaj etendiĝis tra la apuda kamparo. Jam en la 19-a jarcento la eltrovo de novaj minejoj, konkrete pri plata plumbo, favoris la aperon de metalurgia industrio, tio kreskigis la tutan zonon kaj pliiĝis la nombro da enloĝantoj de *Vera* kaj ĉirkaŭaĵoj. Meze de tiu jarcento *Vera* havis pli ol 11.000 enloĝantojn. Dum la 20-a jarcento multaj enloĝantoj enmigris en Katalunion, Francion, Germanion kaj Svision, tio ja okazis en la tuta Andaluzio, kaj tiel la enloĝantaro malpliiĝis ĝis 4.000 enloĝantoj.

Fine de la 20-a jarcento la modernigo de la terkulturado kaj la turismo helpis la disvolvigon de la tuta zono, hodiaŭ *Vera* estas moderna vilaĝo, la ĉefurbo de la almeria oriento kun preskaŭ 15.000 enloĝantoj.

Monumentoj:

- Preĝejo *Nuestra Señora de la Asunción*.

Kiel dirite, post la tertremo de la jaro 1518 oni starigis novan urbon kaj meze de ĝi novan preĝejon, kiu ankaŭ povus utili kiel fortreso, kaze de atako de la berberaj piratoj. La preĝejo estas kvadrata kun fortegaj muroj kaj malgrandaj fenestroj, kiuj povas esti uzataj kiel defendiloj por ĵeti sagojn. Sub la preĝejo oni konstruis cisternon cele la akvo-provizadon de la enloĝantaro se okazus atako.



- Monteto *Espíritu Santo*

Tie stariĝis *Bayira* la islama *Vera*, antaŭ la translokiĝo en la aktualan lokon kie situigas la urbo. Videblaj estas la muregoj kaj sur la pinto de la monto la araba fortreso.

Preĝejo *Nuestra Señora de la Asunción*

- Preĝejo Nuestra Señora de las Huertas

Starigita por memori la helpon de la kristana armeo de Lorca (Murcio), kiu defendis la urbon kontraŭ la atako de la moriska reĝo Aben Humejo. La sieĝo finiĝis la 25-a de septembro 1569. Oni festas ĉiujare pilgrimadon por memori tiun tagon.

Gastronomio:

La gastronomio de la vilaĝo Vera baziĝas sur la apudaj naturaj riĉaĵoj, tio estas la fiŝoj de la Medieranea Maro kaj la legomoj de la hortoj ĉirkaŭantaj Veran. Sendube unu el la plej konataj manĝo estas la *ajo colorao*, kie miksiĝas la bongustaj legomoj (terpomoj, tomatoj kaj kapsikoj) kun la fiŝo rajo. La viando-buloj laŭ la vera stilo estas kuirado de maizo kaj viando. Kaj fine oni devas elstari deliĉa deserto, temas pri la biskvit-paneto kun daktiloj, bongusta memoraĵo de la araba pasinteco de Vera.

Festoj:

Sankta Kleofas (prononcu *Kleofas*) estas la patrono de Vera, ĉar la 25-a de septembro 1569 finiĝis la sieĝo de la moriskaj trupoj sub la ordonoj de Aben Humeja al la urbo. Ekde tiam okazas festoj dum tiu tago ĝis la fino de la monato septembro. Nuntempe oni organizas ankaŭ artan festivalon antaŭ la okazigo de la festoj fine de septembro.

La unua dimanĉo de la monato septembro okazas la pilgrim-festo de la Virgulino de *Las Huertas*. Oni diras, ke la kristanaj trupoj de la apuda vilaĝo *Lorca*, kiuj malebligis la konkeron de Vera fare de la moriska armeo de Aben Humejo, alportis bildon de la Virgulino de *Las Huertas*. Cele la honorigo de la Virgulino oni starigis preĝejon meze de la kamparo kaj dum tiu dimanĉo de la monato septembro okazigas pilgrimadon kun kampara festo.

La Tago de la Maljunulino

Dum ĵaŭdo inter la komenco de Karesmo kaj la Pasko, la *Vera*-anoj forgesas la limigojn de la Karesmo. Antikve estis tute malpermesite manĝi viandojn dum tiu tempo. Temas do, pri ripoz-tago dum semajnoj kiam estis devige fasti. Nuntempe, oni organizas komunajn familiajn manĝo-festojn. Tiu *maljunulino* estas pupo farita el papero kaj ĉifono, kun la kapo plena je dolĉaĵoj kaj karameloj. Ĉiuj infanoj portas siajn proprajn *maljunulinojn*.



Vera, unu el la plej taŭgaj lokoj en Andaluzio por ĝui longegajn plaĝojn.

Kie ajn en *Vera* estas eble trovi paradizan lokon.



Venont-numere Turismi en

Puente Genil (Kordovo)

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Biblioteko de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

La ne-posedo de propra sidejo fare de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo malebligis la ekziston de propra biblioteko. De ĉiam kelkaj membroj de la asocio pruntedonis siajn librojn kiam estis konvene montri ilin okaze de prelegoj aŭ ekspozicioj. Tamen AEU ne posedis propran kolekton de libroj.



En la bildo aperas la ekspozicio pri esperanto organizata en la jaro 2008 en Punta Umbría (Onubo)

Eĉ antaŭ kelkaj monatoj aperis la dubo ĉu tiuj libroj, verdire pruntedonitaj ofte de malaga samideano, apartenis al AEU aŭ ne, kaj post serĉi kaj ne trovi, taŭgajn dokumentojn pruvantaj la apartenon de la libroj fare de nia asocio, ni devis rezigini pri tiu riĉa libraro kun pli ol 300 ekzempleroj, kiuj reale ne apartenis al ni.

Tamen, bona novaĵo ĵus alvenis, dum la Ĝenerala Kuvenco de la Asocio de la pasinta monato februaro, oni sciigis, ke membro de nia asocio decidis havigi al AEU sian privatan esperantan kaj interlingvistikan bibliotekon. La libraro troviĝas ĉe privata domo en Seviljo, tamen ĝi estos tute alirebla se ekzistas antaŭ-informo pri la vizito, prefere dum semajnfine. Same, ekiĝis la katalogado de la libroj, espereble post kelkaj semajnoj kompleta kaj detala katalogo aperos ĉe interreto. Multaj el tiuj libroj, kompreneble ne tiuj pli antikvaj, estos pruntedoneblaj se tio estas petata.

Kiuj libroj troviĝas ĉe la biblioteko de AEU? Nu, entute preskaŭ 500 libroj, revuoj kaj broŝuroj en kaj pri esperanto aŭ interlingvistiko. Kiel dirite, la kompleta katalogo aperos kiel eble plej baldaŭ ĉe interreto mem, kaj tie estos eble legi pri kio disponas nia asocio. Tamen oni povas antaŭdiri, ke tie troviĝas literaturo en esperanto, gramatikaj verkaĵoj, ĉiuj literaturaĵoj eldonitaj ĉi tie en Andaluzio. Ni disponas ankaŭ pri jaraj kolektoj de niaj andaluziaj revuoj, ankaŭ pri *BOLETÍN* de Hispana Esperanto-Federacio kaj la revuo *ESPERANTO*.



Nova Biblioteko de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ankaŭ estas tre enhavo-riĉa la interlingvistika branĉo de la libraro, ni eĉ kuraĝas diri, ke ĝi estas la plej kompleta biblioteko pri Interlingvistiko en Hispanio. Troviĝas tie granda nombro de libroj, broŝuroj kaj eldonaĵoj en aliaj internaciaj lingvoj: *Volapük, Ido, Interlingue, Novial, Interlingua, Unial*, ktp.

Por klarigi definitive la aferon pri la proproco de la biblioteko, post katalogi la tutan enhavon la Prezidanto de AEU kaj la donacanto subskribos donac-protokolon kaj de tiam la biblioteko apertos al nia asocio.

Espereble, post kelke da tempo la tuta arĥivo de nia asocio ankaŭ integriĝos al la ĵus naskita biblioteko.

FLAMENKO

Calixto Sanchez naskiĝis en la sevila vilaĝo Mairena del Alcor en la jaro 1947. Tiu vilaĝo estis la naskiĝ-loko de unu el la plej konataj flamenkaj kantistoj Antonio Mairena. Lia patro regis trinkejon kaj tie mem li komencis kanti antaŭ malgranda publiko, tiu sama publiko kuraĝigis lin partopreni en loka flamenka konkurso, kie li atingis la unuan premion kiam li estis 18-jaraĝa.



Calixto Sánchez
Flamenka kantisto

Ekde tiam li ofte partoprenas en tiaj konkursoj kaj en la jaro 1972 li atingis la unuan premion en la flamenka konkurso okazinta en Granada. En la jaro 1974 aperis lia unua disko, sub la titolo “Estilos Flamencos” akompanita de la gitaristo Melchor de Marchena. Komence de la 80-a jaroj li ĉeestis la Flamenkan Konkurson de Sevilo, kune kun aliaj jam konsideritaj majstroj de la flamenko, kiel Fosforito, Curro Malena, José de la Tomasa. Tiam li atingis la *Giraldillo del Cante*, la plej prestiĝa premio de tiu konkurso. En la jaro 1984 aperis lia disko “De los Alcores a Granada”, akompanita de Pedro Bacan ludanta gitaron. La plej grava originalaĵo de tiu disko, estas la fakto, ke Calixto Sanchez uzis por siaj kantaĵoj tekstojn de la kadiza poeto Rafael Alberti. Tio mem li faris en la jaro 1987 en sia disko “Calle Ancha”, kie li muzikis tekstojn de Antonio Machado.

Estas necese elstari la fakton, ke Calixto Sanchez estas instruisto. En la jaro 1985 ĉe la Sevila Universitato li regis kurson pri

flamenko kaj li kunverkis la libron “Alproksimiĝo al la instraudo de la flamenko”, speciale verkita por la andaluzaj instruistoj pretaj instrui la flamenkan arton ĉe la lernejoj. Kvankam Calixto Sanchez estas konsiderata kiel tradicia kantisto, estas necese elstari ankaŭ sian kreeman faceton. Li posedas povan voĉon kapabla kanti per preskaŭ ĉiaj flamenkaj stiloj.

De la jaro 1996 ĝis 2001 li estris la Andaluzan Centron de Flamenko. En la jaro 2011, li sciigis sian deziron ankaŭ ne partopreni en pliaj flamenkaj festivaloj.

*Per larmoj oni pagas.
Sed la plej granda doloro
estas tiu pri kiu oni ne povas plori.
Tiu ne malaperas, por ĉiam ĝi restas.*



*Calixto Sánchez, unu el la plej ortodoksaj nuntempaj
flamenkaj kantistoj*

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La sen-tomba episkopo de Jaeno

En la jaro 1520 forpasis la jaena episkopo Alonso Suárez de la Fuente del Sauce. Kiel kutime, oni entombigis lin ĉe la katedralo mem, ĝuste ĉe la plej grava kapelo de la katedralo, kio ja estis granda privilegio. Alonso Suárez elstarigis pro sia konstruemo, dank'al li oni starigis preĝejojn, novajn faŝadojn en temploj kaj eĉ ponton en la vilaĝo *Begijar*, hodiaŭ ankoraŭ konata kiel "La Ponto de la Episkopo". Li favorigis la konstruon de la unua katedralo de Jaeno kaj pro tio, oni honorigis lin pere de entombigo ĉe la plej grava loko de la templo.



Malofte malfermiĝis la meblo enhavanta la korpon de la episkopo. En la jaro 1968 tio okazis, tiam oni povis fotografii ĝin.

En la jaro 1635, tio estas post 115 jaroj de la forpaso de la episkopo, oni rekonstruis la katedralon, temas pri la nuntempa belega Katedralo de Jaeno elpensita de la arĥitekto Andrés de Vandelvira. Do, provizore oni eltombigis la korpon de la episkopo ĝis la fino de la konstruado. La tuta katedralo estis rekonstruita, ankaŭ la ĉefa kapelo, tie kie troviĝis unuamomente la tombo de la episkopo Suárez, do, la kanonikaro konsideris pli oportune denove entombigi lin ĉe la ĥorejo apud la ceteraj antaŭaj episkopoj, pro la fakto, ke la ĉefan kapelon oni rezervis por la Sankta

Vizaĝo, la plej grava relikvo de la Jaena Katedralo. Tamen, la familianoj de la episkopo ne akceptis tiun decidon. Naskiĝis tiam disputo inter la jaena kanonikaro kaj la parencoj de la episkopo, kiuj ne akceptis la lokon de la nova entombigo, ili ankoraŭ konsideris, ke la plej taŭga loko estis tiu unue decidita, tio estas la ĉefa kapelo.

Ĝis la definitiva solvo de la disputo, oni decidis lokigi la korpon *provizore* ene de meblo, ĝis kiam la kanonikaro de la katedralo kaj la parencoj de la episkopo povos atingi akordon. Ekde tiam, oni nomis lin “la sen-tomban episkopon”, jaron post jaro la akordo ne alvenis. La parencoj de la episkopo oferis al la katedralo donacojn: mielon, vakson, bestojn... Tamen, la kanonikoj rifuzis ilin. Se iufoje la pastroj akceptus la donacojn tio signifus la konsenton de la entombigo de la episkopo ĉe la ĉefa kapelo; se la familio ĉesus oferi tiujn donacojn tio signifus la aprobon de la horejo kiel novan tombejon de la episkopo fare de la familianoj, do jaron post jaro okazis donac-oferoj kaj jaron post jaro la rifuzo de la kanonikaro. Tio okazis ekde la jaro 1635 ĝis 2001, kaj dum tiu tempo la sen-tomba episkopo restis kaŝita ene de meblo ĉe la arĥivo de la Katedralo.

En la jaro 2001 la nova episkopo de la jaena katedralo atingis akordon kun la familianoj. Finfine oni akceptis entombigi lin denove ĉe la ĉefa kapelo, tie kie ankaŭ troviĝas la relikvo de la Sankta Vizaĝo. Okazis tiam la definitiva entombigo de episkopo, kiu forpasis preskaŭ 500 jaroj antaŭe.



La Jaena Katedralo, sendube unu el la plej misteraj katedraloj en Hispanio.

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: andaluciaesperanto@gmail.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2012

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.



ANDALUZA KUIRARTO

La jaena “ajili mojili”

La *ajili mojili*, prononcu “ahili mohili”, estas tipa manĝaĵo de la provinco Jaeno, ĉefe ĉe tiu parto de la provinco pli proksima al Kordovo. Verdire, mi devas konfesi, ke unu el miaj plej antikvaj memoraĵoj estas tiu pri mia avino ĉe la kuirejo batanta ceramikan poton plena je *ajili mojili*, kompreneble ne per elektrika batilo sed tute permane.

Kvankam oni asertas, ke ĝi estas alia tipo de gazpaĉo, pro la fakto ke la teksturoj de ambaŭ manĝaĵoj estas tre similaj, tamen ankaŭ estas necese diri, ke ĉe la *ajili mojili* ne aperas la tomato, male oni uzas terpomojn por prepari ĝin.



Do, jen la necesaj ingredientoj:

- ½ kilogramo da terpomoj.
- 125 gramoj da ruĝaj kapsikoj.
- ½ ajleron.
- Oliv-oleo.
- Vinagro .
- Salo.

Jen la preparado:

1-e Ni senŝeligas la terpomojn, poste ni distranĉas ilin en pecojn.

2-e Ni boligas la terpomojn kune kun la ruĝaj kapsikoj. Ĉi-lastaj ne distranĉitaj, nur purigitaj, tio estas senŝeligitaj kaj sen grajnoj.

3-e Ni batas, uzu elektrikan batilon, la kuiritajn terpomojn, la kapsikojn, la ajleron, sufiĉe abundan ŝprucon da oliv-oleo, la salon kaj iomete da vinagro, ĝis la atingo de densa kremo.

Kiamaniere oni povas manĝi ĉi tiun kremon? Nu, oni povas ŝmiri friktitan panon per *ajili mojili*, ĝi povas akompani perfekte kiun ajn fiŝon kaj eĉ oni povas manĝi ĝin per kulero, tio estas kiel la gazpaĉo aŭ la salmoreho.



LUDU KUN NI

Ĉu Vi praktikas sporton ?



2012 estas olimpika jaro. Divenu kiel nomiĝas la jenaj olimpikaj sportoj. Se Vi uzas ĉiujn silabojn Vi trovos la nomon de kvin olimpikaj sportoj. La unua silabo de ĉiu sporto troviĝas sur la plej maldekstra kvadrato. La ceteraj silaboj estas tute malordigitaj. Neniu silabo aperas dufoje kaj neniu silabo restas senutila.

VO	TER	PO	LO
AR	LI	PA	DO
HAL	NU	LEJ	LE
KA	FO	NO	KO
TRAM	BA	A	VO

Vi sukcesis, ĉu ne? Jen la nomoj:

① _____ ② _____ ③ _____

④ _____ ⑤ _____

Interlingvistika Logiko

Preskaŭ ĉiuj interlingvoj baziĝas sur la logiko. Tamen, ĉu estas eble uzi la logikon se oni parolas pri la historio de la internaciaj lingvoj. Jen propono: Divenu la naskiĝo-jaron de kvin internaciaj lingvoj, kompreneble inter ili esperanto, por atingi tion Vi devos uzi nur tion: la logikon.

- ① Ludwik Lejzer Zamenhof ne elpensis Esperanton dum la 20-a jarcento.
- ② Post lerni *Ido* kaj esperanton, Otto Jespersen ellaboris sian projekton *Novial*.
- ③ *Ido* naskiĝis dum la 20-a jarcento.
- ④ Alexander Gode rifuzis la lingvojn lernitaj de Otto Jespersen, li estis la inicianto de *Interlingua*.
- ⑤ L. Zamenhof menciis *Volapük*, kiam li prezentis sian lingvon.

Nu, en kiuj jaroj aperis la lingvoj *Ido*, *Volapük*, *Esperanto*, *Interlingua* kaj *Novial*?

1879 → _____

1887 → _____

1907 → _____

1928 → _____

1951 → _____

HUMURO



La n-ro 94-a de nia revuo aperos, espereble, dum la monato aprilo 2012. Se Vi deziras kunlabori, proponi, sugestii, kritiki, bv. kontakti kun ni. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto de Sevilo: José Roldán León
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
 esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

ESPERANTO

125

1887-2012